

pola esperantisto

socikultura revuo de
polaj esperantistoj

Jaro 97 • N-ro 6/2003 • ISSN 0032-2431



ANDRZEJ KOEFANGWICZ 2003

6
2003

Enhavtabelo:

163 ENKONDUKE

HISTORIE

165 *PORTRETOJ – Isaj Dratwer*

168 *HISTORIE KAJ NUNTEMPE – Aktualeco de la Zamenhofa penso.*

ALIFLANKE

173 *Morgaŭ signifas Hodiaŭ.*

175 *Proklamo de Poznano.*

176 *OPINIOJ, REAGJOJ, KRITIKOJ*

LINGV(ISTIK)A ANGULO

180 *Praktika uzado de la prepozicio POR.*

182 *Mondo, lingvo kaj vortaro.*

LIBROJ

186 *Vivo de Andreo Cseh.*

187 *Krótká historia Volapüku.*

188 *KULTURO – aktualaĵoj.*

190 *MOVADO – aktualaĵoj.*

La kovrilpaĝo: krakova Ĉefplaco – sub ombrelaro de multaj kafejetoj estas loko por ripozi, kafumi, kaj admiri la belecon de la urbo. Desegnis: Andrzej Kołpanowicz.

polaj esperantisto

socikultura revuo de polaj esperantistoj, aperas 6 fojojn jare
eldonas: Eldonejo HEJME, <http://www.hejme.e-tools.pl>
Redakcia stabo: Zofia BANET-FORNALOWA, Czesław BARANOWSKI,
Zbigniew GALOR, Andrzej KOŁPANOWICZ, Ilona KOUTNY, Kazimierz
LEJA (ĉefredaktoro), Lidia LIGĘZA, Stanisław MANDRAK, Danuta
ŻELIŃSKA kaj multaj kunlaborantoj.

Ĉiujn korespondantojn kaj materialojn sendu al la adreso de la
eldonejo (prefere retpoŝte: esperanto@hejme.e-tools.pl).

Jarabono pola: 30,00 PLN pagenda al:

Wydawnictwo HEJME, 41-250 Czeladź, ul. Wąska 21
BRE Bank SA-mBank • 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al:

UEA-konto: <kazl-s> • FEL-konto: <leja-t>

Jaro 97 • N-ro 6 / 2003 • ISSN 0032-2431

aktuala eldonkvanto: 220 ekz.

La finiĝanta jaro, plena de streĉo kaj persista laboro, feliĉe kunportis ankaŭ bonajn novaĵojn. Multaj sukcesoj de polaj esperantistoj, kiuj evidentiĝis en diverslokaj Esperanto–aranĝoj, partopreno en pluraj internaciaj renkontiĝoj, reaperigo de PE, sukcesa eldono de kelkaj novaj libroj... esperigas tiujn, kiuj ekkonis aŭ eksciis pri Esperanto antaŭ ne longe, kaj instigas Esperanto–agantojn por pli efika agado kaj laboro estonte.

Inter „venkintoj” troviĝas pluraj lokoj de nia lando, kiujn mi ne volas mencii, por ne malatenti aliajn. Tamen ni povas facile konstati, pri kiuj temas, legante atenteme sekvajn numerojn de la revuo, partoprenante organizatajn de ili aranĝojn, ktp.

Permesu al mi, ke mi faru escepton. Mi volas mencii la „Oran Duopon”, kies multjara aktivado plu daŭras, malgraŭ diversaj malfacilaĵoj kaj malfaciligoj, kaj kiu kunportas al nia komunumo pli da gloro kaj rekonno. Temas kompreneble pri la paro Zofia kaj Jerzy Fornalowie, kies ora jubileo de geedziĝo pasis ĉi–jare. Ilia aktiveco povas servi kiel ekzemplo por ni ĉiuj, kaj certe servas. Ni kore gratulas al ili ambaŭ kaj deziras multe da sano, forto kaj interesiĝo pri la efektoj de ilia laboro flanke de diversaj esperantistaj medioj.

Por supervenki malfacilaĵojn, pri kiuj tiom ofte ni ŝatas interparoli, bezonatas nur du faktoroj: (1) nia vizio (kion ni celas, kio estas por ni grava, kion ni volas atingi), kaj (2) ĉu ni volas dediĉi al tiuj aferoj nian koron kaj nian tempon. Neniu venko venos, se oni scipovas nur plendi, kritiki kaj pasive atendi... miraklojn. Eĉ religiemuloj scias, ke miraklojn antaŭas preĝoj, fasto, pento. Ke homo atendanta Dian intervenon devas unue repaciĝi kun siaj proksimuloj, forĵeti envion, malamon, esti indulgema.

Ĉu ni havas brilan vizion por nia plua agado? Ĉu ni havas konkretajn celojn, kiujn ni volas atingi? Ĉu ni estas solaj en tiuj planoj aŭ niaj amikoj pensas simile kiel ni? Ĉu ni estas pretaj dediĉi pli da tempo por efektiviĝi aferojn pravajn, bezonatajn, atendatajn, necesegajn?

Niaj strukturoj (klubo, asocio, societo, grupo) devas servi por niaj komunaj celoj, kiuj estas: informado pri Esperanto, instruado de Esperanto, kaj perfektigiĝado en la lingvo–uzo. Tiujn celojn ni neniam atingos, aŭ atingos tre baldaŭ — tio dependas de ni mem, de la du faktoroj, menciitaj pli frue.

Ni ne timu venontajn venkojn! Kontraŭe, ni akcelu ilin per konkreta laboro kaj bonaj elektoj. Ni ne restu

solaj en nia agado, konstruante sian propran fortikaĵon (privataj kontaktoj, privataj hobiaĵoj, privata plezuro), sed ni pensu pri aliaj samideanoj, kiuj eble bezonas nian helpon, instigon, nian tempon dediĉitan al ili.

Inter la celoj, kiuj devas esti atingitaj, estas instruado de Esperanto. Celo tiel evidenta, ke tro ofte malatentata. Se ni ne scipovos aranĝi kursojn, se ni ne instruos Esperanton, neniu supera forto konvinkos homojn pri utileco de la lingvo internacia. Por faciligi tiun taskon Eldonejo HEJME kaj PEA komencis kuneldonadon de lernolibroj de Esperanto. Aperis ĉi-jare 2 titoloj, aliaj 3 aperos baldaŭ. Pri ĉiuj ĉi mi informis kaj sur la paĝoj de PE kaj sur retpaĝoj de la eldonejo.

Alproksimiĝas la Nova Jaro 2004. Ĉu ĝi alportos al niaj vicoj pli da esperantistoj? Ĉu t.n. „ekstera mondo” rimarkos la ekziston de Esperanta komunumo en nia lando? Ĉu ni revenos al helaj jaroj de espero, por ke Esperanto trovi ĝustan lokon en polaj lernolibroj kaj estu instruata en la lernejoj? Denove la samo: ĉio dependas de ni.

„Pola Esperantisto” volas kaj pretas servi por vi ĉiuj. Viaj rimarkoj kaj esprimitaj diversmaniere atendojn povos esti grandparte plenumitaj; ja nia revuo celas atingi vastan esperantistaron, esti interesa kaj atendata por plimulto. Dekkelkaj legantoj de PE jam profitis la eblecon kunredakti la revuon. Iliaj tekstoj aŭ jam ape-

ris, aŭ baldaŭ aperos sur niaj paĝoj. Kelkaj — malgraŭ antaŭa promeso — ne sukcesis ĝis nun kontribui aŭ faris tion en formo nekonvena.

La sorto de PE dependas precipe de vi. Vian aktivecon priskribu, diskonigu. Trovu plurajn novajn abonantojn. Faru tion, kio eblas, kaj se ne eblas, provu tion fari!

Al ĉi tiu numero de PE aldoniĝas „reABONilo”, kiu enhavas simplan enketon, direktitan al la legantoj. Bonvolu esprimi viajn atendojn pri la enhavo de la revuo, kaj resendu al la redakcio. Viajn opiniojn ni tutcercte tralegos kaj efektivigos.

Jam nun mi promesas, ke venontjaraj kajeroj de PE estos ankoraŭ pli interesaj kaj variaj. Iomete ŝanĝiĝos ankaŭ la aspekto de la revuo (tamen ne atendu koloran eldonon, por kiu vi ne volas/povas pagi). Ŝanĝiĝos ankaŭ la eldonto: PE aperados ne komence, sed fine de ĉiu „nepara” monato. Pro tio ankaŭ ĉi tiu numero aperas nekutime malpli frue.

Mi plu serĉas aŭtorojn de facilaj legaĵoj kaj porinfanaj materialoj. Kvankam la revuo ne estas adresata al „eternaj komencantoj”, tamen ili ekzistas inter ni.

Fine, mi volas danki al ĉiuj bonvolemuloj, kies sindediĉo kaj kunlaboro permesis eldoni ĉiujn 6 numerojn de la revuo. Iliajn nomojn vi povas eltrovi sur la paĝoj de PE. Tiujn, kies kontribuajoj ankoraŭ ne aperis, mi petas pri pacienco...

Isaj Dratwer (1905–1985)

Isaj Dratwer naskiĝis la 1an de januaro 1905 en Odeso (la „Enciklopedio de Esperanto” erare informas, ke li naskiĝis en Varsovio). Infanaĝe kun la familio li translokiĝis al Varsovio. Dum la Unua Mondmilito la tuta familio ek troviĝis en Mohi-

lev, Ukrainio, kie en 1919 jaro li fariĝis esperantisto, estante tiam lernanto de la 4a klaso de gimnazio. Li fondis en la urbo E-Junularan Rondon. Poste li estis kunfondinto de Distrikta Komitato de Tut-Rusia Esperantista Federacio.

En 1921 li revenis kun la familio al Varsovio kaj de tiam komenciĝis lia ĉiam pli vasta, fruktodona E-aktivado. Li kapablis ligi sian laboron por Esperanto kun studoj ĉe la Varsovia Universitato, same poste, kiam, kiel magistro pri bakteriologio, li profesie, plenofice laboris. Lige kun sia profesio li kutimis ŝerco diradi, ke li estas por ĉiam

infektita de „...verdaj bakterioj”. Eble per tio oni devas klarigi lian neimageblan energion, persiston kaj sindediĉon...

Isaj Dratwer komencis sian varsovian aktivadon en junulara sekcio de „Laboro” (laborista E-orga-

Ĉi-foje ni prezentas silueton de Isaj Dratwer – esperantisto, kiu dediĉis grandan parton de sia vivo al enkorpiĝo de Zamenhofa homaranisma idearo, kies portanto estas Esperanto. Same kiel prezentitaj jam en nia ciklo samideanoj S. Karolczyk kaj J. Zawada, li ligas la intermilitan pollandan Esperanto-movadon kun la renaskiĝinta en tre malfacilaj kondiĉoj, postmilita. La meritoj de tiu ĝisosta esperantisto estas netrotakseblaj.

nizo en Pollando), komence de la 20aj jaroj, sed plene ekgiĝis dum siaj studentaj jaroj, aktivante unue kiel estrarano kaj poste kiel prezidanto de Akademia Rondo (AER) ĉe Juda Akademia Hejmo. La organizo ekzistis ekde 1923 ĝis 1933. Jam dekomence ĝi fariĝis la plej aktiva kaj inventema E-or-

ganizo en Varsovio kaj Isaj Dratwer estis ĝia bona spirito. AER konstante organizis kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Dratwer funkciis do ankaŭ kiel instruisto. La organizo distingiĝis per sistema, altvalora laŭteme prezentado de prelegoj, ĉar Dratwer kapablis allogi plej eminent-

tajn E-fakulojn, estimatajn pionirojn, por nur mencii kelkajn landajn kaj eksterlandajn prelegantojn, kiel: prof. J. N. Badouin de Courtenay, Lidja Zamenhof, E. Cense, J. Baghy, E. Morariu kaj li mem ankaŭ ofte sukcese prelegis.

Sukcesajn propagandajn E-seminariojn lanĉitajn de AER imitis poste esperantistoj en pluraj urboj de Pollando.

Karavanoj al landaj E-kongresoj, ekspozicioj, modele funkcianta riĉa E-biblioteko kaj legejo, vigla propagando por Esperanto pere de centoj da afiŝoj presitaj de AER, organizado de prelegvojaĝoj tra Pollando de eksterlandaj esperantistoj kaj dekoj da aliaj iniciatoj de AER, kies ĉefaganto estis Dratwer. Li vekis admiron kaj estimon. Kiam en 1933 AER devis ĉesi sian agadon, Dratwer ekagis por organizi novan E-asociacion en kies kadroj oni povus daŭrigi la laboron. Malgraŭ la malfavora politika situacio, lia persista aktivado donis rezulton kaj jam aŭtune de la sama jaro fondiĝis Varsovia Esperantista Societo (VES), kiu laŭnome, same laŭ bonega laboro digne kontinuus la tradicion de la Zamenhofa VES, kreita en Varsovio en decembro 1904 (ĝia unua prezidanto estis vokita la kreinto de Esperanto mem). La prezidanto de tiu dua VES estis de la komenco ĝis la eksplodo de la Dua Mondmilito ĝia fondinto, Isaj Dratwer. VES estis en la komenco de la 30aj jaroj sola so-

cieto en Pollando, kiu ne nur ne stagnis, sed montris grandegan, diversflankan vigecon. VES estis tiam ankaŭ la sola E-organizo en Varsovio, kiu ĉiujare organizis imitindajn solenaĵojn omaĝe al L. L. Zamenhof. Ĝi famiĝis per prelegserioj, kiujn ĉeestis amaso da personoj. Oni notis ofte 150! En ĝia klubo estis murgaze-to. Ĝi havis bonajn kontaktojn kun Pola Radio kaj „Nasz Przegląd” (Nia Trarigardo), kiuj disvastigis informojn favorajn por E-aktivado. Laboro daŭris senĉese: 5-foje semajne oni povis tie, en la ejo de VES, renkontadi kaj pasigi vesperojn en vere esperantista medio.

Kiam faŝismo plene montris sian antihoman, kriman vizaĝon, VES en siaj rezolucioj, per artikoloj, akre protestis kontraŭ diversspecaj persekutoj pro rasaj kaŭzoj.

En 1939 pasis 5 jaroj ekde la fondiĝo de VES. Okazis ĉi-okaze impona solenaĵo, kiun ĉeestis multaj gastoj, ankaŭ el eksterlando. La kunvenon honoris per sia alveno dr-ino Zofia Zamenhof, filino de la kreinto de Esperanto. Jen kion ni legas i.a. en la lasta, antaŭmilita „Pola Esperantisto” (n-ro 7, 1939) pri ĝia agado dum tiu jaro, tre malfacila por Esperanto:

„VES estis vera torĉo, kiu subtenis E-fajron en Varsovio, ĝi estis ofte sola posteno de nia movado, kaj senlace laboris gvidata de s-ano Dratwer, fondinto kaj konstanta prezidanto de la Societo”.

Por fini pri la agado de Dratwer en la intermilita periodo oni ne-pre devas almenaŭ menci organizitajn de li du sukcesajn Postkongresojn en Varsovio en 1927 kaj 1931 kaj venkan batalon por alinomigo de str. Dzika, kie preskaŭ ĝis la morto loĝis L.L. Zamenhof — je strato Zamenhofa. Dratwer estis iniciatinto kaj plenumanto de ĉiuj organizaj laboroj ligitaj kun ĉi tiu entrepreno. Li aranĝis preson de kelkmilo da folioj, enhavantaj koncernan peton kaj lokon por 50 subskriboj. Dank' al lia pena kaj arda laboro oni kolektis ĉirkaŭ 25 mil da subskriboj de varsovianoj, postulantaj tiun ŝanĝon. Tio finfine instigis la magistraton al alinomigo de almenaŭ parto de la strato Dzika je str. Zamenhofa (1931).

Fine de la 30aj jaroj, kiam Pola Radio pro politikaj kaŭzoj (i.a. kresko de antisemitismo) tute neglek-

tis Esperanton, Dratwer entreprenis kampanjon por ŝanĝi tiun rilaton al la lingvo internacia. Denove multe da laboro inter polaj kaj eksterlandaj esperantistoj, bedaŭrinde senrezultata. Proksimiĝis la plej terura milito, kiu ĉion detruis, dum kiu pereis milionoj da homoj kaj inter ili preskaŭ ĉiuj kunbatalantoj de Dratwer. Mi volas ĉi tie menci kelkajn liajn plej intimajn E-kunlaborantojn en VES, por ankaŭ ilin honori. Ili estas: Adolf Kerner, Henryk Reuter, Dora Kagan, Bela Słuszna, Anna Miłnik, Mira Freiman. Ilin kaj multajn aliajn samideanojn Dratwer scipovis entuziasmigi kaj organizi por impona E-laboro, kaj tiu kapablo estis grava trajto de Isaj Dratwer — arda Esperanto-aganto.

Zofia Banet-Fornalowa

(daŭrigo en la sekva numero)

Adam Asnyk **Progreso („Daremne žale”)**

Laboroj vanaj! Vana plend!
Senforta malbenado!
La formojn mortajn ia sorĉ'
Ne turnos al estado!

Per temp' preniton al la temp'
Ne povas mond' depreni!
Ne povos fajr', ne povos glav'
Kurantane penson teni...

Kun vivaj ĉiam iru vi!
La novan vivon amu!
Obstine per velkinta laur'
La kapon ne ormanu!

Ne repuŝebla viva ond'!
Sencele vi sopiros!
Koler' senforta! vana plend'!
Antaŭen mondo iros!

Aktualeco de la Zamenhofa penso

Afrodito, la ĉarma amdiino kaj la patrino de Amoro, naskiĝis en mara ŝaŭmo ĉe la suda parto de Cipro. Kiel grekino, ŝi estus nun civitanino de la Cipra Respubliko kaj kiel tia ne povus viziti siajn ŝatatajn lokojn en la norda Cipro, ĉar ekde 30 jaroj la insulo estas dividita per pikdrata barilo, la lasta muro de Eŭropo.

Forte staras muroj de miljaroj inter la popoloj dividitaj...

Tiuj ĉi vortoj evidentiĝas ne nur esperantista himno, sed ankaŭ politika deklaro aŭ eĉ soci-politika diagnozo. Ludoviko Zamenhof formulis ĝin fine de la 19a jarcento. Ĉe la komenco de la 21a ĝi estas eĉ pli aktuala. Zamenhof ne nur diagnozis, sed ankaŭ preskribis recepton: „*Sed dissaltos la obstinaj baroj per la sankta amo disbatitaj*”. Esperantistoj tro facile konsideris tiujn ĉi vortojn idealisma naiveco de la kreinto de Esperanto.

Lastatempe dum foliumado de eksterlanda gazetaro aparte atentigis min artikolo en „Le Nouvel Observateur” sub la titolo „La muroj kreskas” kaj alia en „Der Spiegel” — „Ni bezonas pontojn”. Ambaŭ titoloj ŝajnas esti re-skribitaj el la libro „La Zamenhof-strato”, kies la unua ĉapitro estas titoli-

ta „La muroj” kaj la lasta „La pontoj”.

La franca semajnevuo kritikis Israelon pro la konstruado de giganta muro, 8 metrojn alta kaj 120 km longa, ĉirkaŭ la tiel nomata „okcidenta bordo de Jordano”. Laŭ la israela vidpunkto la muro celas kontraŭstari terorismon. Tamen por starigi la muron estis necese aneksi plian parton de la palestina teritorio, krome la muro praktike enklavigas kelkajn palestinajn urbojn, malebligas al infanoj frekventi lernejojn, al la kamparanoj kultivi iliajn terpecojn, baras trafikon en kelkaj lokoj, ŝtopas interkompreniĝon kaj firmigas malamon.

La germana revuo „Der Spiegel” publikigis intervjuon kun la fama israela pianisto kaj orkestrestro Daniel Barenboim. Li arde pledas por la starigo de la palestina sendependa ŝtato kaj por la firma paco inter ambaŭ popoloj surbaze de la reciproka respekto. La esencon de la intervjuo oni povas surprize resumi jene: „*Sed dissaltos la obstinaj baroj per la sankta amo disbatitaj*”. Do, Barenboim kopias la recepton de Zamenhof. Li fine konkludas: „Ni devas konstrui pontojn, ne murojn”. La nepo de la kreinto de Esperanto, Ludoviko Zaleski-Zamenhof finas per preskaŭ

sama frazo sian intervjuon, kiu konsistigas libron „La Zamenhof–strato”: „Ni konstruu pontojn de espero, kiuj kondukas al interkompreniĝo”.

Koncerne la muron ĉirkaŭ la „okcidenta bordo”, mi volas pesi argumentojn de neniuj partio. Mi volas nur emfazi la politikan klarvidecon de Zamenhof. Kiel studento en Moskvo li ekinteresiĝis pri la cionisma movado. Tio estis natura reago de juna homo kontraŭ la pogroma uragano, kiu tiam trafis liajn samgentanojn en la suda Rusio kaj Ukrainio. Reveninte al Varsovio li daŭrigis sian por–cionistan agadon, sed subite ĝin forlasis. Estis almenaŭ du kialoj. Unue li rekomencis serioze labori pri sia lingvo internacia, due li ne aprobis la ideon restarigi la judan ŝtaton en Palestino. Li prezentis raciajn argumentojn.

Palestino ŝajnis al li tro malgranda lando por akcepti ĉiujn judojn de la diasporo kaj tro malfekunda por ilin vivteni. Se nur parto de la judoj — li rezonis — migrus al la Proksima Oriento, tiam la judoj restintaj en siaj lokoj eĉ pli suferus persekutojn kaj devus ĉiam aŭskulti: „Iru for al via Palestino”. Zamenhof konsideris nerealista la ideon krei hebrean ŝtaton sur la teroj, kiuj tiam apartenis al la islama Turkio. Krome li dubis ĉu la potenca okcidenta mondo allasos, ke judoj okupu la sanktajn kristanajn lokojn. Fine li timis, ke loĝantoj de la israela ŝtato daŭre alfrontos malamon de la indiĝenoj. Li supozis, ke „la judoj en Palestino estos eterne kiel sur

vulkano”.

La historio korektis parton de liaj duboj. Zamenhof ne antaŭvidis la progreson de agrikulturo, kiu ebligis fekundigi dezerton. Sed li trafe asertis, ke la „promesita lando”, eĉ transformita en Edenan ĝardenon, povas enteni nur parton de la judaro; ke la granda plimulto restos en diasporo kaj plu suferos persekutojn. Ĉu persekutojn? Zamenhof tragike eraris koncerne la nocion, anstataŭ „persekutoj” li devus uzi la vorton „holokaŭsto”. Li ne konis tiun ĉi vorton, sed li intuicie antaŭsentis tiun teruran fenomenon. Tamen Zamenhof ne eraris supozante, ke „en Palestino la judoj vivos kiel sur vulkano”. Tiu profetaĵo bedaŭrinde konfirmiĝas preskaŭ ĉiutage. Ankaŭ konfirmas ĝin la muro konstruita ĉirkaŭ la „okcidenta bordo de Jordano”. La Zamenhofa vizio entenis eĉ pli teruran averton, li diris eksplicite, ke efektivigo de la cionista ideo establi la Israelan ŝtaton en Palestino povas rezultigi „la kvaran eksodon” de hebreoj. Fakte Zamenhof ne antaŭvidis la grandegan politikan, ekonomian kaj militan helpon, per kiu Israelon subtenas Usono.

Tamen la tiama Usono estis por Zamenhof ĝusta teritorio, sur kiu povus esti establita moderna Israelo. Li ne estis sola, kiu tiel pensis. Dum kelka tempo ardis ene de la cionista movado disputo inter la „usonanoj” kaj la „palestinanoj”. Finfine venkis la palestina koncepto. Zamenhof ĉesis pledi por la usona solvo, sed samtempe li entu-

te forlasis la cionisman movadon. Post kelka tempo, nome en la jaro 1914, li eksplicite konfirmis sian negativan rilaton al cionismo. „Mi ne volas ligi min kun la hebrea nacionalismo, sed mi volas labori nur por la homa justeco absoluta”. Ĉeokaze li aldonis interesan komenton: „Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon kaj ke celado de ĉiuj homoj devas esti: krei harmonian homaron. Se la nacionalismo de gentoj premantaj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas malprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj”.

Tuj eksplodinta Unua Mondmilito plene pravigis lian opinion. Dum la milita hekatombo apenaŭ komenciĝis kaj milionoj da homoj mortadis en nomo de siaj kontraŭstaraj patriotismoj, Zamenhof jam pensis pri la postmilita aranĝo de la mondo. Fine de la jaro 1914 li skribis sian „Alvokon al la Diplomatoj”. Konkrete li celis politikistojn, kiuj post la milito „kunvenos kaj penas reordigi la rilatojn inter la popoloj”. „De vi dependos — skribis Zamenhof — ĉu la mondo havu fortikan pacon por tre longa tempo aŭ eble por ĉiam aŭ ĉu ni havu nur kelktempan silenton”. Li starigis demandon: „Ĉu vi komencos simple refaradi kaj flikadi la karton de Eŭropo?” Sekve Zamenhof atentigis: „Kiam ajn vi volos kontentigi la popolojn, kiam ajn justaj vi penas esti kontraŭ diversaj gentoj, vi nenion

atingos per refarado de la karto, ĉar ĉiu ŝajna justeco koncerne unu genton estas samtempe maljusteco koncerne alian genton”. En la decido diktita de la venkinto al la venkito ĝermas — laŭ Zamenhof — la kialo de nova batalo, ĉar tiamaniere firmiĝas la divido je gentoj premantaj kaj gentoj premataj, kiu kaŭzas la malamaron.

Tiuj ĉi vortoj sufiĉas ne nur por kompreni, kial estas konstruata la muro ĉirkaŭ la okcidenta bordo de Jordano, sed ankaŭ kiujn fruktojn ĝi alportos. Konklude mi citu la opinion, kiun la israela artisto esperimis en la supremenciita intervjuo: „Se iam la ŝtato Israelo ĉesus ekzisti, se ĝi evidentiĝus mallonga epizodo en la longa historio de la israela popolo, tiam nur ni estos pro tio respondecaj”.

Dum ĉiu UK ni kantas pri la „muroj de miljaroj”, foje forgesante pri ilia reala ekzisto. Ne ĉiam ili estas konstruitaj el betono aŭ elektrizitaj pikdratoj, plej ofte ili havas formon de burokrataj ĉikanoj. Mi suferis ilin multfoje, kiam mi devis stari en longaj humiligaj vicoj por ricevi vizon al landoj, kiuj arogis nomi sin liberaj. Jen paradokso: mi ne havis problemon eliri el la „mallibera mondo”, en kiu lokigis min la historia hazardo, sed oni ne volis min akcepti en la „libera mondo”. Ĉu Vi scias, kiu UK estis por mi la plej bela? Tiu en Bergeno. Ĝi estis la unua Esperanto Kongreso en mia vivo, okazinta en la Okcidento, kiun mi povis partopreni sen la pena almozado pri vizo.

Kiel ĵurnalisto de la Pola Televido mi havis kelkajn okazojn propraokule observi konkretajn barojn, mi vidis ilin kiel ilustraĵon de la Zamenhofa aserto pri la „muroj inter la popoloj dividitaj”. Ĉiukaze mi sentis korskuon. Jen la 38a latitudo dividanta la korean popolon. Dum la duona jarcento eĉ muso ne sukcesis ĝin libervole transiri. Mi vidis de la suda flanko la „pikdratojn de ploro”, staris antaŭ ili koreoj kaj ploris pro siaj familianoj aŭ amikoj, kiuj restis nordflanke, kaj kies sorto fariĝis sekreta por ĉiam. Ekde tiu tempo nenio ŝanĝiĝis. Panmunĝonon daŭre gardas taĉmentoj de UN. Fakte mi vidis tie nur soldatojn de la usona armeo. Sed mi vidis ankaŭ usonajn soldatojn ĉe la grandega muro en Tijuana sur la limo kun Meksikio. Ĉu vi scias, ke en la limzono inter Usono kaj Meksikio oni ĉasas milojn da homojn, kiuj provas transiri la limon? Ĝi estas kelkmil kilometroj longa. Nur en kelkaj lokoj staras konstruitaj muroj. Laŭ la tuta limlongeco funkcias alispeca muro, konsistigas ĝin modernaj teknikaj ekipaĵoj, kiuj permesas kontroli ĉiun metron da tero kaj aero tage kaj nokte.

Nome de la Pola Televido mi ĵus vizitis Turkion kaj la Nordan Cipron. Frukto de la vojaĝo estas tri filmoj. Unu el ili portas titolon „La muro kontraŭ Afrodito”. La muro sur Cipro estas hontinda fakto por la kelkmiljara Eŭropa civilizo! Eble pro la honto oni tiom obstine silentis pri ĝi. Fakte ekzistis alia kialo, la konflikto koncernas

du ŝtatojn—membrojn de NATO.

La muro inter la suda kaj norda partoj de Cipro estas klasika Zamenhof—Esperanto—Objekto. Se la juna Ludoviko naskiĝus ne en Bjalistoko, sed en la nuna Cipro, li trovus tie la saman inspiron por repacigi homojn dividitajn pro lingvo kaj religio. En la nordo loĝas turkoj islamanoj, en la sudo — grekoj kristanoj. Multe oni devus paroli pri la detalaj kaŭzoj, pro kiuj la loĝantoj de la insulo dividiĝis en du malamikajn grupojn. Fakte la kialoj estis similaj kiel pli malfrue en Bosnio, Kosovo ktp. Nun mi preferas koncentriĝi pri perspektivoj de la repaciĝo kaj tial mi devas ankoraŭfoje referenci la „Alvokon al diplomatatoj”, en kiu Zamenhof eksplacite konstatas, ke la konfliktojn inter la gentoj de la kontinento oni povas vere solvi nur enkadre de — aŭskultu! — Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo. Krome li profete proponis fondi Konstantan Tut—Eŭropan Tribunalon por juĝi maljustaĵojn faritajn de unuopaj registaroj. Ĉu vi konsciis pri tio, ke Ludoviko Zamenhof jam antaŭ cent jaroj pensis pri la Eŭropa Unio kaj pri la Tribunalalo en Strasburgo?

Oni povas esperi, ke ekzakte laŭ la Zamenhofa scenaro solviĝos la konflikto sur la insulo de Afrodito. Kiel sciante, ĝia greka parto aliĝos baldaŭ al la Eŭropa Unio. Ekde kelka tempo ankaŭ Turkio frapetas al ĝiaj pordoj. Daŭras diskutoj, ĉu en la kristana Eŭropo estas loko por la islama ŝtato. La respondon por tiu ĉi demando do-

nos la nova Eŭropa konstitucio. Kelkaj ŝtatoj, interalie Pollando, insistas meti en ĝian preambulon preskribon pri la kristanaj valoroj, kiel morala fundamento de la Eŭropa integriĝo. Tiel formulita preambulo estus muro kontraŭ la aliĝo de Turkio. Verŝajne la Eŭropa Parlamento ne starigos ĝin.

Se ni havus en Strasburgo esperantistan lobion, ni povus proponi preskaŭ pretan tekston de la preambulo. Mi pensas pri la principoj de homaranismo. Ili perfekte respondas la bezonojn de la nuntempa Eŭropo. Homaranismo prezentas plian konfirmon de la longvidkapablo kaj realismo de Zamenhof. Mi ripetas la vorton realismo, por kontraŭstari la stereotipon pri homaranismo kiel religia mistikismo de Zamenhof. Tiu ĉi opinio estas rutine heredata ekde la Kongreso en Bulonjo-sur-Mar, dum kiu Zamenhof estis fakte ĉikanita de ĝiaj organizantoj tiomgrade, ke li ne rajtis deklami la tutan tekston de la „Preĝo sub la Verda Standardo”.

Mi ne havas tempon por detale preparoli homaranismajn ideojn, tamen mi volas atentigi pri tiuj, kiuj neiel koncernas religion, sed entenas pure politikajn postulojn. Zamenhof

kelkfoje eksplicite uzas terminon „homaj rajtoj”. Nuntempe homaranismo fariĝis io laŭmoda en nia movado. Estas multaj publikajoj pri tiu temo. Foje mi havis la okazon ĉeesti kunvenon de homaranisma komunumo. Ĉie oni parolas pri homaranismo kiel religia koncepto, dum laŭ mia opinio ĝi apartenas al tiuj ideoj, kiuj fundamentas la „Ĉarton de la Homaj Rajtoj”, formulitan nur 30 jarojn post la morto de Ludoviko Zamenhof.

Je la fino jen mia persona, eĉ intima refleksio. En la sesdekaj jaroj mi plurfoje staris antaŭ la betonaj barilegoj dividantaj Friedrichstrasse en Berlino. Mi atendis tie okcidentgermanan esperantistinon. Ŝi venis el la okcidenta Berlino, kiu por mi estis fermita, kaj rajtis resti kelkajn horojn en la orienta Berlino. Dum unu el tiuj renkontiĝoj ni decidis geedziĝi. Tiam la vortoj de la esperantista himno: „*Kaj dissaltos la obstinaj baroj per la sankta amo disbatitaj*”, fariĝis por ni aktuala defio, nepre realigenda scenaro. Esperanto evidentiĝis por ni reala ponto kaj samtempe la ponto de espero. Nu, la Berlina muro „dissaltis”, la espero restis.

Roman Dobrzyński

Valoras aboni:

La Ondo de Esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2003. № 11 (109)

Morgaŭ signifas Hodiaŭ

1

Marjorie Boulton en sia makia-vela verko „Faktoj kaj fantazioj” en fragmento titolita „Klaraj mesaĝoj” prezentas mesaĝon, kiun dom-mastrino lasis por la laktisto: *Mi ne bezonas lakton hodiaŭ. „Hodiaŭ” signifas „morgaŭ”, ĉar mi skribis tiun noton hieraŭ.* Dom-mastrino ne povis supozi, ke en estonteco ŝian mesaĝon iu citos en Esperanta libro.

2

Tempo kiel mezuro de Esperanto-movado kaj kiel valoro en ĝi. 116 jaroj post la Unua Libro estas eĉ ne aĝo de plej maljunaj homoj — Hunzoj loĝantaj en Himalajo ĝisvivas eĉ 150 jarojn! Tio estas tre mal multe en la historio de civilizoj, kiuj diferenciĝas ankaŭ pere de rilato al pasinteco. Ili starigas ĝin sur la unuan lokon aŭ tiun ĉi lokon ili rezervas por nuntempo aŭ estonteco. La klasika Zamenhofa ideologio de Esperanto-movado lanĉis la bazan rolon de espero. Ja tiu „morgaŭ” devas kunporti venkon de la internacia lingvo. Espero ekzistas nur lige kun estonteco. „Morgaŭ” havas do por esperantistoj la plej gran-

dan signifon. Kvankam tiun rolon devas plenumi la „hodiaŭo”. La aktualaj fortostreĉoj decideme formas la kondiĉojn por estontaj agoj. Tiel: „morgaŭ” komenciĝas „hodiaŭ”. Kaj la dom-mastrino alskribus: „morgaŭ” signifas „hodiaŭ”.

3

La tension de „morgaŭ” (por kiu „hieraŭ” kaj „hodiaŭ” funkcias nur kiel servantoj) elteni estas tre malfacile. Ne nur civitanoj de socioj en kiuj regas principo vivi/labori por estontaj generacioj, ankaŭ multaj esperantistoj ne eltenas. Des pli tiam, kiam 116 jaroj ŝajnas al ili sufiĉa tempo por ke „hodiaŭ” ekvidi la iaman „morgaŭan” celon realigita. Kaj des pli por tiuj, por kiuj sociaj procezoj (kune kun popularigo de la lingvo) okazas same rapidaj kiel ŝanĝo de televidprogramo.

4

Triopo: estis, estas, estos, ligiĝas kun ĉiu nuna momento. „Nun” kreiĝas por ni en la rilato al estinteco kaj estonteco. Ankaŭ la nunaj esperantistoj troviĝas inter certaj „poste” kaj „antaŭe”. Unuflanke, la ĝisnuna historio kaj praktiko de la E-mova-

do. Aliflanke — alvokoj devenantaj de ĝiaj celoj, individuaj atendoj. Kaj ankoraŭ forpaso de aliaj esperantistoj. Post la morto de Tomek Kudrewicz iu skribis al mi pri sia ŝoko: „prenita el breto, kies tempo ankoraŭ ne venis”!

5

Ĉe la tombo ne ekzistas saĝuloj, aŭ ĉiuj estas saĝaj: Epikteto mortis, ĉar ĉiu vivo mortas; Sokrato aŭ dormas sensenteme aŭ ĝuas senmortigon; Fichte nur trairis el la una vivo al la dua. Samtempe vivo — ankaŭ esperantista — ne eltenas malplenaajn lokojn. Memoro plenumiĝas je novaj vizaĝoj aŭ/kaj elvokas vivantajn malnovajn.

6

Memoro pri E-historio: homoj kaj E-aferoj, de tempo al tempo favoras false imagi, ke ĉio grava en la E-movado jam okazis, kaj en fono de nuntempaj problemoj anstataŭ espero aperas pli ofte malespero, seniluziigo. Karakteriza estas ĉi tie, kiel mantrao ripetata

opinio: „hodiaŭ” estas pli malbone ol „hieraŭ” sed pli bone ol „morgaŭ”. Se „hodiaŭ” signifas „morgaŭ”, tiam, ĉe tiu aliro, iu pli facile, pli ol malpli frue, demetos de sia kostumo signon kun la verda stelo.

7

La hodiaŭa E-movado estas lernanto de la hieraŭa kaj instruisto de morgaŭa movadoj. Kiel lernanto ĝi lernas ankaŭ baze de pasintaj eraroj, misvojaj. Kiel instruisto ĝi scias, ke ne karaktero de celo de grupo plejgravas por ĝia integriĝo. Nerealaj celoj (ekz. nuligi terorismojn) ankaŭ bone „kungluas” sociajn grupojn. Krome, la instruisto konscias, ke multaj esperantistoj iĝas membroj de la movado ne pro deklarata movada ideologio, sed pro diversaj aliaj propraj motivoj kaj interesoj. De tiu perspektivo la movado baziĝas sur „imagita komunumo”. Ĝi kreiĝas „hodiaŭ” kaj decidas pri „morgaŭ”. Kaj pri tio, ĉu la espero renaskiĝas, ĉu ne.

Zbigniew Galor

PROKLAMO DE POZNANO

Proklamon pri elĉerpiĝo de la paradigmo finvenkismo-raŭmismo kunverkis István Ertl kaj Zbigniew Galor, kiu ankaŭ prezentis ĝin enkadre de la XIX ARKONES — 27.09.2003. — en Poznań (Pollando) dum primovada panel-diskuto, kiun gvidis Tadeusz Chrobak. Ni ĝin aperigas por pripensigi la legantojn. Se vi opinias same, bonvolu sendi mesaĝon kun vorto Jes! kaj via nomo al adreso: zgalor@au.poznan.pl



PROKLAMO PRI ELĈERPIĜO DE LA PARADIGMO FINVENKISMO–RAŬMISMO

Ni, sube subskribintaj partoprenantoj de la XIX ARKONES en Poznań,

rekonante

- ke la koncepta paro *finvenkismo–raŭmismo* estas unu el la plej sterilaj neologismoj de la Esperanto–movado en la lasta kvaronjarcento,
- ke dokumentoj kritike opiniantaj pri ĝi restas nerimarkataj, kiel la Proklamo de Voss el 1991, kiu diras:
 - ke *...konflikto inter kultur–flegemaj kaj fin–venkemaj esperantistoj estas transpontebla...*,

konstatinte

- ke finvenkismo kaj raŭmismo, se entute nomi ilin tiel, kunloĝas en ĉiu el ni,
- ke la ĝisnuna praktiko de ĝia uzado uzi ĉi tiun pensokadron evidente pruvis ĝian ties falsecon, dogman, valorpritaksan karakteron, malantaŭ kiu troviĝas vulgare ideologia pensadmaniero,
- ke la koncepta paro damaĝas la riĉan bildon de ideologioj ligitaj kun la Esperanta movado, ĉar ĝi devigas pensi nur pri du el ili, kvankam ekzistas tiaj historiaj ideotendencoj kiel: laborista movado, kristanisma socidoktrino, novaj sociaj movadoj, ideologio de hobiismo — ĉiu el ili elemento de riĉeco de la Esperanto–kulturo,

rekomendante

al ĉiu esperantisto, kiu ne kutimas trakti mitojn kiel faktojn

proklamas

ELĈERPIĜON DE LA PARADIGMO FINVENKISMO–RAŬMISMO!

**Detlev Blanke, Tadesz Chrobak, István Ertl, Zbigniew Galor,
Georgo Handzlik, Paweł Janowczyk, Zbigniew Kornicki, Ilona Koutny** ⇨

Estimata Redaktoro!

Respondante al via redaktora artikolo (PE 3/2003) kaj alvoko por praparioli la neŭtralecon de UEA mi opinias, ke tia neŭtraleco donas neniajn pozitivajn efektojn. Ĉiuj ŝtatoj, nacioj, havas siajn proprajn interesojn. Ankaŭ Esperanto-movado havas siajn interesojn popularigi Esperanton, enkonduki ĝin al ĝenerala uzo por bono kaj profito de plej multaj homoj. Ĝi devas havi tre klaran kaj decidatan rilatan koncerne al paco kaj milito. Esperanta movado devas decide kontraŭstari militon, imperialismon militan, ekonomian, edu-

kan, lingvan ktp.

Ni ne povas kondukti objektivajn, neŭtrale, koncerne al agresia milito de Usono kontraŭ Irako, kontraŭ iraka popolo. Ni devas ĝin tre decide kaj akre kondamni. Ni estos pli respektataj de Usono, almenaŭ rimarkataj, kiel malgranda, sensignifa malamiko ol kiel ni estus neŭtrala nulo.

Politiko de UEA estas falsa. Neŭtraleco donas nenion. Ni batalu ne nur por la lingvo Esperanto, sed pere de ĝi, malgraŭ niaj etaj eblecoj, ni batalu kontraŭ maljusteco, kontraŭ agrezaj militoj. Ni apogu neesperantistajn organizaĵojn en iliaj bataloj por justeco. Ni abomenu falsan de politikistoj. Ni ne timu, tiam ni pli valoros ol nun, kiel la organizaĵoj por neŭtralaj hobiistoj.

Władysław Burszta



Kara Sinjoro.

Kun granda intereso mi tralegis en la 3a n-ro de „Pola Esperantisto” Viajn redakciajn konsiderojn „Legu kaj vekiĝu!” Ĝis nun mi naive pensis, ke en la pola Esperantujo ne povas troviĝi kontraŭuloj de aliĝo de Pollando al Eŭropa Unio, aliĝo, kiu donos bonajn kondiĉojn por disfloro de la pola Esperanto-movado. Ja ideo de unuiĝo de la homaro en unu rondon familian allogas jam kelkajn generaciojn de esperantistoj en la tuta mondo. Ĉi tiu ideo estis ĉefa instigo por kreado kaj disvastigo de nia Universala Lingvo. Plej bonaj homoj de la tero dum miljaroj revis pri unuiĝo de la homaro.

⇒

Ĝis la 10.11.03. la Proklamon (vidu paĝon 175) apogis: Ann-Louise Åkerlund; Petko Arnaudov; René Ballaguy; Anna Besenyeyi; Marteno Bustin; Jeanne-Marie Cash; Probal Dasgupta; Julianna Farkas; Rudolf Fischer; Ursula Grattapaglia; Giuseppe Grattapaglia; Markus Heupel; Jozefo Horvath; Ottmár Járeb; Neil Mac Kiligin; Andrzej Kiszkiel; Walter Klag; Jan Książek; Christian Lavarenne; Carmel Mallia; Luigia Oberrauch Madella; Ivo Osibov; Valentin Melnikov; Ludoviko Molnár; Klaus Morhoff; Bjarke Nielsen; Dario Rodriguez; Junia Perkins; Andrijev Pechonkin; Llibert Puig; Jacques Le Puil; Gian Piero Savio; David Schamgar; Josef Shemer; Milan Svěda; Peter Tihanyi; Lucas Yassumura; Giuseppe Valente. [z.g.]

Organizo kaj larĝigo de Eŭropa Unio estas unu el paŝoj en ĉi tiu direkto, la paŝo, kiun devas bonvenigi senescepte ĉiuj esperantistoj. Ĉi tiu paŝo estas praktika efektivigo de aspiroj de la pioniroj de Esperanto—movado kaj la krento de Esperanto Ludoviko Zamenhof. Ĉiuj ili celis detru i murojn inter la popoloj, murojn de malamikeco, religia fanatikismo kaj naciismaj antaŭjuĝoj. Jene skribis fama esperantisto—pioniro, poeto Stanisław Karolczyk en la malproksima jaro 1912:

*„Antaŭen fratoj ĉiam vi,
Ni murojn rompu antaŭ ni!
Ĉar antaŭ ni, post tiaj muroj,
Estonto brilas en lazuroj...”*

Ne ĉiuj nun memoras, ke pri kreado de federacia unio de eŭropaj landoj revis la granda filo de Pollando — Marŝalo Piłsudski. La fervora apogo de la larĝigo de Eŭropa Unio flanke de papo Johano Paŭlo la dua, la plej granda morala aŭtoritato de la nuna epoko, estas bone konata ne nur en katolika medio.

Estas ĝenerale konata onidiro, ke la homoj malvastmensaj fortikigas landlimojn, la homoj malkaŝaj malfermas ilin. Laŭ mia ŝajno en nombron de la homoj malvastmensaj oni ne povu enkalkuli ĉiujn kontraŭulojn de la eniro de Pollando en Eŭropan Union, ĉar granda parto de ili nur sincere timas eventualajn negativajn sekvojn, kiuj povus aperi post la eniro. Kiam ili konvinkigis, ke ilia timo estis imagita kaj senkaŭza, ili apogos saĝan epokan decidon de la granda parto de la pola popolo.

Sed estas alia speco de kontraŭuloj de la larĝigo de Eŭropa Unio, la homoj venenitaj per naciisma egoismo, inter kiuj, mi esperas, oni ne povas trovi esperantistojn. Ili reprezentas nur marĝenon de la pola socio, sed estas

plej kriemaj kaj malicaj el ĉiuj. Iliaj orogojlo, netoleremo kaj aroganteco ne havas limojn. Revante pri nova „Berlina muro” ĉirkaŭ Pollando, konstruota el brikoj de malamego, ili semas timon kaj murdas esperon. Ekzistas danĝera malsano: ksenofobio. Ĝi estas nekura-cebla. La lingvaĵo de ĉi tiuj kontraŭuloj similas al la freneza lingvo de la du iam frataj ideologioj, kies fundamento estas perforto: la ruĝa kaj bruna ideologioj.

En la kvara n-ro de „Pola Esperantisto” mi tralegis leteron de unu samideano, kiu riproĉis la ĉefredaktoron de la revuo pri „reĝima kontraŭpopola vomokaŭzanta” porunia propagando. La letero embarasigis min ne pro la enhavo, mi jam al kutimiĝis al similaj argumentoj, prenitaj el arsenalo de „Ligo de la Polaj Familioj”. Mirigis min nur fakto, ke la aŭtoro de la letero estas ESPE-RANTISTO.

De la homo mem dependas, ĉu post li ekkreskos rozarbusto, ĉu hundoharbo...

Georgo Suchno, Skierniewice



UEA kaj ĝia „neŭtraleco”

Redaktoro Kazimierz Leja priskribas en *Pola Esperantisto* 3/2003 („Legu kaj vekiĝu”) la dubindan konkretiĝon de la politika „neŭtraleco” de UEA dum la milito kontraŭ Irako. Mi devas fari unu faktan korekton: neniu oficisto de UEA estis kritikita pro publika sinesprimado kontraŭ la milito. Konflikto okazis, ĉar unu oficisto proponis utiligi tiujn retadresojn de nederlandaj esperantistoj, kiujn la Centra Oficejo konas, por mobilizati al partopreno en la centra nederlanda kontraŭmilita manifestacio en februaro. Tio laŭ la UEA—estraro —

almenaŭ laŭ ĝia prezidanto — estus nekonsilinda atenco kontraŭ la statuta „neŭtraleco“.

Ĉi tiu epizodo igas dubi pri la taŭg-eco de neŭtraleco-kompreno, kiu ne allasas, ke asocio mobilizu al protest- agado kontraŭ ago de milita agreso, eĉ kiam tiu evidente malmuntas la siste- mojn de internacia juro kaj de la UN. Sed la „neŭtraleco-koncepto“ de UEA — kiel oni nuntempe interpretas ĝin — estas problema ne tiom pro strute- co kiom pro nekonsekvenceco. Ĝi ka- pricas laŭ specifa maniero, kiu faras ĝin falsa kaj eĉ danĝera.

Dum ĉi tiu „neŭtraleco“ blokas ĉiajn pli ol nur abstraktajn kontraŭmilitajn eldirojn, ĝi neniel malhelpas, ke UEA, la Brusela Komunikadcentro kaj iuj landaj asocioj regule eltrovigas antaŭ la oku- lojn de la publiko dubindajn kaj unu- flanke politike tendencajn ideojn, kiuj „decas“ tial, ke ili portas la figfolion de lingvopolitika rilateco.

Unu tia afero estas la lingvonaciis- mo, kiu alstrebas etne purigi naciajn lingvojn je fremdaj leksikaj elementoj (ĉefe anglismoj), pri kiuj oni fantazias, ke ili atakas la (unuflanke konceptatan) „identecon“ de la homoj. Ĝin Esperanto laŭdire kapablas „savi“.

Alia afero estas la senĉesa fluo de subtila propagando en la eldonaĵoj de la UEA-sistemo (bedaŭrinde ankaŭ foje, sed malpli ofte, en SAT) favora al unuflanke etnecon emfazanta rigar- do al la kultura diverseco kaj alarman- ta pro ties laŭdira „perdiĝo“. Kvankam ĉi tiuj ideologioj fatale inkliniĝas en la direkto de etnonaciismo kaj novdek- stra etnoplurismo, la „neŭtraleco“ ne bremsas ilin — pro la en ili ĉiam enten- ata lingvopolitika elemento.

La de redaktoro Leja cititaj „mez- epokaj“ antaŭjuĝoj pri „judoj kaj fra- masonoj“ ne estas simple ekstremisma

anomalio en la Esperanto-komunumo. Ili estas la facile rimarkebla pinto de glacimonto el samtendencaj, sed poli- tike pli modernaj kaj pli singarde for- mulataj timobsedoj.

La lingvopolitika orientiĝo — en UEA laŭstatute esceptita de la „neŭtral- eco“ — facile iĝas etnopolitika okup- iĝo. Tio ne estas tabuinda. Sed la du- ona „neŭtraleco“ bredas etoson de ĝeneralpolitika inerteco, kiu efikas mal- viglige al la kritiko de ekaperantaj et- noplurismaj, naciismaj k.s. tendencoj, ĉar tia kritiko pro sia naturo ne povas esti mallarĝe lingvopolitika.

Ĉu la nun praktikata kaprica „neŭtral- eco“ ne malutilas pli ol ĝi utilas?

Gary Mickle, Germanio



Lingva angulo en E-revuo estas tre bonvena. Precipe kaj prefere ne tro va- sta. Du paĝoj kun 11 punktoj pri LA estas tro por komencantoj. La artikolo en Esperanto apartenas ne al gramati- ko, sed al stilistiko. Principo de sufiĉo kaj neceso postulas ŝpari aldonajn vor- terojn kaj literojn. Ekvilibro de koncizo kaj klaro faras la frazon eleganta.

Esperanta gramatiko ne bezonas ar- tikolon por indiki substantivon — por tio sufiĉas finaĵo -o. Esperanto ne ko- piu etnolingvan artikoluzadon, sed evoluigu propran minimuman regula- ron. Por uzendo de LA sufiĉu du-tri re- komendoj:

1) LA montras jam menciitan aŭ in- dikatan objekton, nepran parton de la kunteksto;

2) LA estas alternativo de TIU, TIU ĈI, MIA, VIA, NIA, LIA ktp. Artikolo apenaŭ estas necesa antaŭ la nomoj de unikaj, unusolaj objektoj, ne konsiderataj ies apartenaĵoj;

3) LA signifas la tuton da difinita

aro, ĈIUJN indikitajn objektojn;

4) La nomoj de riveroj, maroj, montoj, stratoj, festoj, societoj, klasikaj libroj, alprenas LA nur se ili komenciĝas per komunvorta epiteto aŭ konsistas nur el komunaj vortoj.

Nur necese uzata LA ne estos superflua balasto.

Valdo Banaitis, Vilno

P.S. Superflua estas ge- en rekomendo korespondi kun 2-3 gesamideanoj — ĉu temas nur pri paroj?

INTERNACIA PEDAGOGIA ESPERANTO-KURSO

Por studado en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz — Klerigejo de AIS aliĝis ĉi-jare pli ol 100 gestudentoj el 18 landoj de la mondo. Dum tri monatoj instruas tie Esperanton kaj hispanan lingvon ASci. Augusto Casquero de la Cruz el Valencio. Pri Aŭstralio instruis ankaŭ Zelimir Pehar el Melbourne, krome pluraj polaj instruistoj.

Dum 30 januaro – 8 februaro 2004 en Bydgoszcz okazos Internacia Pedagogia kurso por Esperanto-Instruantoj, kiun ĉefe gvidos ASci. Ewa Bondar — instruistino de Internacia Cseh-Instituto en Hago. Prelegos pri pedagogio kaj metodiko de instruado ankaŭ polaj specialistoj de Porinstruista Cen-

tro de Edukado en Bydgoszcz. Kurson kompletigos ankaŭ prelegoj pri turismo kaj videofilmado. La kursoj dum 30 januaro–8 februaro 2004 kostos 100 EUR aŭ 100 USD, kion aliĝante oni pagu al la konto:

Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo, PL 85-094 Bydgoszcz, str. M. Skłodowskiej-Curie 10,

Bank Pocztowy, kontonumero:

80 13201117 2034 0100 2000 0001

SWIFT kodo: „POCZPLP4”.

Tranoktoj en Bydgoszcz eblas en apudaj studenta domo po 5 EUR aŭ en sporta hotelo po 7 EUR.

Pagante 100 EUR aŭ 100 USD por kursoj Vi povas ankaŭ veni por tuta monato de 11 januaro ĝis 9 februaro 2004, tiam Vi ricevos rabatitan loĝadon en la hotelo — 60 EUR por la tuta monato. Se Vi pagos 200 EUR aŭ 200 USD, Vi rajtos studi de 12 januaro – 2 majo 2004, same pagante hotelon po 60 EUR monate kaj partoprenante la 29 Esperanto-Tagojn de Bydgoszcz kaj 25 AKB-Sesion dum 24 aprilo – 2 majo 2004, kun ekzamenoj por Internaciaj Vojaĝgvidantoj.

Komenciĝis jam aliĝado por la studado ĉe ISTK/AKB por la jaro 2004/2005 — ĝis la 31a de decembro 2003 promocio tutjara studadkotizo estas ankaŭ 200 EUR aŭ 200 USD.

Venu al internacia studado en Bydgoszcz!



Valoras aboni:

TORNADO

MAGAZYN MIŁOŚNIKÓW MIĘDZYNARODOWEGO JĘZYKA ESPERANTO

Praktika uzado de la prepozicio PRO

En la perfektigado de la lingvo internacia oni devas ankaŭ dediĉi sian atenton al la korekta aplikado de diversaj prepozicioj, kiuj ja tre malofte estas uzataj memstare. Post multaj ekzercoj en praktika uzado de la prepozicio **por** ni okupiĝu nun pri la prepozicio **pro**, konsistanta el la samaj literoj. La diferenco inter **por** kaj **pro** estas tia, ke **por** indikas ĝenerale **celon** kaj **pro** — **kaŭzon**, ekz.: La homoj aĉetas multajn manĝaĵojn **por** festotagoj. **Pro** festotagoj ĉiuj oficejoj kaj bankoj estas fermitaj

Tiu ĉi ĝenerala kaŭza prepozicio **pro** estas uzata sufiĉe ofte por montri:

- **la kaŭzon de ago**; ekz.: **Pro** ĉiutaga promenado mia sanstato pliboniĝis. Lia koro ĉesis funkcii **pro** neatendita infarkto. Ŝiaj palpebroj malleviĝis **pro** stranga dormemeco. Mia filino ploris **pro** la dentodoloro. Multaj homoj senfortiĝas **pro** la malsato. Miaj ŝuoj malnoviĝis **pro** la marŝado en neĝopluvo. **Pro** la fajrero ekbrulis arbaro. Ŝia vizaĝo fariĝis sulkiĝinta **pro** maljuneco. Vi devas pensiigi **pro** la malsano. Multaj ho-

moj mortas ĉiujare **pro** la ajdoso kaj kancero. **Pro** la bankroto de mia laborejo mi fariĝis senlaborulo.

En ĉi tiuj ekzemploj **pro** plejparte anstataŭas: **sekve de, kaŭze de, de.**

- **la motivon de ago**; ekz.: Mi venis Mielnon **pro** Jubilea ĈEP-aranĝo. Ŝi ridis **pro** lia naiveco. Ĉiuj admiris ŝin **pro** ŝia beleco. Multaj timas stiri aŭton **pro** vigla trafiko. Mi estis ravita **pro** lia ĝentileco. Geamikoj trinkis **pro** lia sano. Ĉu vi estas kontenta **pro** via sorto? Mi dankas **pro** via korvarmiga amikaĵo. Ŝi ĝojas **pro** sia sukceso. Mi amas vin **pro** via bonkoreco. Se vi ne venos vespere, mi pretas morti **pro** timo.

(En ĉiu frazo la subjekto agas laŭ propra iniciato kaj libera decido).

- **la objekton, kiun oni interŝanĝas kontraŭ alia**; ekz.: Kion vi donos **pro** tio? Kion vi pretas doni **pro** tiu ĉi ampleksa pola-Esperanta vortaro? **Pro** pola ŝinko estas importataj aliaj varoj. Mi aĉetis la hundojn **pro** 20 zlotoj. Manĝaĵon aĉetu de ili **pro** mono. Ni dividu inter ni la monon **pro** la vendita biciklo. Mi

demandis, kiom li postulas **pro** la malnova aŭto. Okulon **pro** okulo, denton **pro** dento.

Rimarko 1. La distingo inter **kaŭzo** kaj **celo** de ago ne estas ĉiam klara, kaj tial la prepozicioj **por** kaj **pro** povas havi sencojn preskaŭ identajn. Zamenhof iam skribis:

„fosi **pro** akvo”, ĉar vere la akvo estis **motivo** por fosado, sed oni preferu rigardas ĝin ĉikaze **celo** (**por** akvo). Laŭ **PIV** oni ne povas diri: „morti **por** nesingardemo” anstataŭ „morti **pro** nesingardemo”. Inter „morti **por** la patrujo” kaj „morti **pro** la patrujo” ekzistas nur nuanco: la unua esprimas **entuziasmon** (ĉar la bono de la patrujo estis celo de la sinofero) kaj la dua esprimas **rezignacion**. Same en du aliaj ekzemploj: „pagi monon **pro** io” (oni insistas pri la elspezo) kaj „pagi monon **por** io” (oni insistas pri la akiro).

Rimarko 2. Ankaŭ la aŭtoritaton, kiun oni privokas en sia intereso, oni povas rigardi **motivo** kaj uzi **pro** antaŭ ĝi: restu, **pro** Dio! **pro** la ĉielo, **pro** la diablo. (laŭ PAG)

Rimarko 3. La prepozicio **pro** estas iafoje anstataŭata de la prepozicio **de**, ekz.: Ŝi ruĝiĝas **pro** honto, sed ankaŭ ŝi ruĝiĝas **de** honto. Li paliĝis **pro** timo kaj mi paliĝis **de** kolero.

Oni povas diri: Ŝi tremas **de** malvarmo kaj li estas tremanta **pro** la agonio. Infano krias **de** doloro kaj patrino krias **pro** la danĝero. Li brulas **de** amo al ŝi, kaj ŝi brulas **pro**

malpacienco.

Rimarko 4. Laŭ **PAG** oni devas skribi:

La tero estas kovrita **de** neĝo (ĉar aktive oni ne povus diri: iu kovris la teron **per** neĝo); **sed oni skribas**: La tablo estas kovrita **per** blanka tablotuko (ĉar aktive oni povas diri: mi kovris la tablon **per** blanka tablotuko).

Rimarko 5. Laŭ **PIV** oni povas danki iun **por** io, sed ankaŭ danki al iu **pro** io aŭ esti sendanka al iu **pro** io. **Ni ofte estas skribantaj**:

Mi dankas al vi **pro** via letero aŭ mi dankas vin **por** via letero. „**Danki pro...**” estas tamen pli oportuna en poezio, ĉar oni povas mallongigi: „**danki pro l' via letero**”, dum oni ne povas mallongigi „**por l' via letero**”.

Rimarko 6. La prepozicio **pro** estas tre ofte uzata en kunmetita subjunkcio, esprimanta kaŭzon aŭ motivon; ekz.: Mi ne indulgos ilin **pro tio, ke** ili fortranĉis ĉiujn arbojn apud mia domo. Vi ne kulpiĝu min **pro tio, ke** mi ne plenumis vian peton.

Anstataŭ **pro tio, ke** oni povas uzi la konjunkcion **ĉar**. Ekz.: Mi ne venis hieraŭ al vi **pro tio, ke** (= **ĉar**) mi estis tre okupita.

Estas ankaŭ bone scii, ke anstataŭ **por kio** kaj **pro kio** oni povas diri simple **kial?** Ekz.: **Por kio (kial)** vi kunvenas? **Por kio (kial)** vi intencas forveturi Mielnon? **Pro kio (kial)** via filino ploras? **Pro kio (kial)** via edzino estis krianta hieraŭ?

Mondo, lingvo kaj vortaro

Vortprovizo spegulas la mondon

Por povi paroli pri la — ekstera aŭ interna — mondo, ni bezonas nomi la objektojn, estaĵojn, agojn, sentojn kaj abstraktajn nociojn. La vortprovizo de iu lingvo en iu epoko spegulas la materian kaj spirit-an kulturojn de ĝiaj uzantoj. Esplorante restaĵojn de malnovaj lingvaj fragmentoj, oni povas ekhavi informojn pri la vivmaniero kaj vivmedio de iu popolo (vestaĵoj, uzataj iloj,



Ni tamen tre malofte uzas la prepozicion **pro** en la funkcio de prefikso; ekz.:

- anĝelo **pro**parolanta — (parolanta anstataŭ iu, favore **pro** iu);
- **propeti** iun — (peti iun favore al alia).

En la **PROVERBARO ESPERANTA** prilaborita de Ludoviko Zamenhof troviĝas ankaŭ proverboj kun la prepozicio **pro**. Jen kelkaj por ellerni ilin parkere:

Pro eraro ne praviĝas la faro. **Pro** homo fiera ĝojas infero. **Pro** multo da arboj li arbaron ne vidas. **Pro** najleto bagatela pereis ĉevalo plej bela. **Pro** vorta piko ofte perdiĝas amiko. **Pro** limoj kaj baroj malpacas najbaroj.

ĉirkaŭantaj floroj kaj bestoj). Laŭ la ŝanĝo de vivmaniero aperas kaj malaperas vortoj, sed parto povas transvivi en la frazeologiaĵoj (ekz. *la suno leviĝas*).

La vortprovizo spegulas ankaŭ kelkajn rilatojn inter la nocioj, mondkoncepton de siaj parolantoj. La hungara lingvo havas komunan vorton *hagyma* por *cepo* kaj *ajlo* (por precizigi oni antaŭmetas *vörös-* kaj *fok-* al *hagyma*), *arbo* kaj *ligno* konsistigas unu nocion, eĉ distingo lingva inter *li* kaj *ŝi* ne ekzistas. La pola *ser* povas signifi *kazeon* aŭ *fromaĝon* (por precizigi oni povas antaŭmeti *biały* aŭ *żółty*). Similajn diferencojn eblas trovi multe. La mapado de la realaĵo al la lingva ebena diferencas de lingvo al lingvo.

La frazeologiaĵoj havas sian mondon. Kaj la proverboj estas kompreneblaj kutime nur baze de kultura fono.

Se ni esploras la uzokuntekston de iu vorto, ni vidas, ke ĝi estas ofte uzata kun kelkaj aliaj (traserĉante grandan tekstaron ni povas konvinkiĝi pri tio) — tiujn tipe aperantajn elementojn determinas ĝia signifo kaj la aktuala mondo. Ekzemple de *laboro*, ni trovas *mensa/fizika/publika/nigra laboro* aŭ *konstanta/sezona/varia/monotona/malfacila*, aliflanke

plenumi/serĉi laboron, ktp. Tiuj oftaj vortkombinaĵoj, „kolokaĵoj” estas karakterizaj por la donita vorto.

Kiel envortarigi la vortprovizon?

La plejmulto de vortaroj — unu- aŭ dulingvaj — estas alfabetigitaj. Anatole France nomis la vortarojn „universo ordigita laŭ alfabeto ordo”. Tiu ordo estas konvencia kaj la vortoj rapide retroveblaj, tamen multaj el iliaj naturaj rilatoj perdiĝas.

Ekzistas vortaroj, kiuj provas kapti iujn el la nociaj rilatoj inter la vortoj, ekz. sinonim- kaj antonimvortaroj, bildvortaroj, laŭ nocioj ordigitaj fakaj tezaŭroj kaj temvortaroj. Ĉi lastaj prezentas la vortprovizon laŭ diversaj temoj kaj subtemoj de la ĉiutaga vivo. Tiuj kolektoj rekte servas la lernadon, ja diversaj temoj estas preparolataj dum lecionoj, estas necesaj por ekzamenoj, kaj eĉ rememori vortojn pli facilas en konvena kunteksto, en grupoj. Same nia konversacio koncentriĝas al diversaj temoj. Tiuj ĉi vortaroj pli nature proponas ankaŭ la kulture ligitajn elementojn, en ilia natura loko.

Strukturita Esperanta Temvortaro (SET)

La vasta projekto SET prezentos la lingvan bildon de la mondo en laŭtemaj grupoj (verŝajne en 33 ĉapitroj) kaj nun aperas en pecoj. La unua volumeto, kiu traktas la temojn **Lernado kaj Laboro**, aperis en

la pasinta jaro (vidu recenzon en PE 4/2003). La sekva volumeto de la serio CELTRAFO estas la nuna **Lingvoj kaj Komunikado**. En la unua versio la vortaro estas 3 lingva, nun angla-Esperanta-hungara, sed estas planoj aldoni aliajn lingvojn. La germana-Esperanta-pola lingvotriopo sekvos. Iam ekestos ankaŭ Esperanta klariga vortaro.

La vortgrupoj, t.e. vortartikoloj ene de ĉapitro sekvas unu la alian en iu logika ordo, ekz. la ĉapitro pri *lingvoj kaj lingvistiko* entenas kiel kapvortojn la bazajn nociojn rilatajn al lingvoj, gramatiko kaj diversaj terenoj de lingvistiko, kiujn oni bezonas, se oni lernas kaj interesiĝas pri lingvoj: *lingvo, parolo, gramatiko, ortografio, interpunkciilo, litero, skribo, lingvistiko, lingva signo, komunikado, normo, lingvoscio, dulingvismo, tradukado, interpretado, lingvopolitiko, etimologio, retoriko*. La listo de ĉ. 250 lingvoj estas nur elekto el la pli vaste uzataj kaj konataj.

Ne temas pri terminaro, ĉar ĝi ne kontentigas la striktajn terminologiajn postulojn, tamen ĝi estas unu paŝo en tiu direkto, elirmaterialo por la iama pli grandskala laboro, ja — strange — mankas esperanta lingvistika terminaro, malgraŭ la abunda okupiĝo pri lingvaj problemoj en Esperantio.

En la dua ĉapitro pri *komunikado praktike* mi kolektis parolturnojn de la ĉiutaga komunikado, kiu abundas je frazeologiaĵoj kaj tre varias de

lando al lando, sed en esperanto nur malmultaj fiksiĝis.

La entrepreno estas interesa eksperimento el du vidpunktoj. Unuflanke mi provis priskribi la mondon per kelkaj vastaj temoj kaj per pli konkretaj subtemoj (po 4–10 en unu ĉapitro). La subĉapitroj konsistas el vortartikoloj kun ĉefaj nocioj (bazaj nocioj de la tereno) kiel kapvortoj. La aliaj vortoj — necesaj kaj utilaj por ilia uzo — aperas en la vortartikolo en 4 grupoj.

- La unua grupo prezentas la ti-

pojn de la kapvorto (ĉe lingvo ekz. *gepatra, fremda, natura, planita lingvo*);

➤ la dua la **verbojn kaj verbajn esprimojn** (ekz. *deveni el io, disvastiĝi, formorti*), kiuj estas uzeblaj en tiu kunteksto;

o la tria la **adjektivojn** (ekz. *aglutina, komuna, endanĝera*), kiuj karakterizas la ĉefvorton;

♣ la malpli gravaj **vortoj asoci-eblaj al la kapvorto** aperas en la 4a grupo (ekz. *lingvoparenceco, universalajo*).

language

- mother tongue
- foreign ~
- natural ~
- living, modern
- dead
- planned ~
- sign
- spread
- originate from sg
- die out
- o agglutinating
- endangered
- common
- ♣ linguistic affinity
- language area
- speakers of the same
- language
- universal
- working method

lingvo

- **gepatra** ~
- fremda** ~
- natura** ~
- viv(ant)a**
- mort(int)a**
- planita** ~
- gesto**~
- **disvastiĝi**
- deveni de io**
- formorti**
- o **aglutinaa**
- endanĝera**
- komuna**
- ♣ **lingvoparenceco**
- lingvoareao**
- samlingvanoj**
- universalajo**
- labormetodo**

Nyelv

- anya~
- idegen~
- természetes ~
- élő
- holt
- tervezett ~
- jel~
- elterjed
- Ered vmből
- kihal
- o agglutináló
- veszélyeztetett
- közös
- ♣ nyelvrokonság
- nyelvterület
- azonos nyelvet beszélők
- univerzálé
- munkamódszer

Kiam aldoniĝas iu elemento, kiu estas en la vortnesto de iu vorto jam figuranta, aŭ iel asociiĝas al tiu inter-

na vorto, tiam ĝi aperas en la sekva nivelo, do iomete pli dekstren ŝovita (vidu *lingvoparenceco* kaj *parencaj*

lingvoj). Tio kreas tezaŭran strukturon. En tiu ĉi ordigo sinonimoj troviĝas kutime unu apud la alia kaj klarigoj (kursive en krampoj) helpas distingi ilin. Ankaŭ la stiletikedoj *formala*, *neformala*, *slanga* kaj *pejorativa* estas uzataj tiucele.

Aliflanke du lingvoj paralelas al esperanto en la vortaro. Esperanto servas por mapi la lingvajn bildojn de la du etnaj lingvoj, kio estas sufiĉe malfacila kaj riska tasko, ja la angla-usona lingvo kaj la hungara estas malproksimaj laŭ strukturo, semantiko kaj laŭ ilia fona kulturo. La malavantaĝo de esperanto estas, ke kelkfoje mankas la precizaj kaj establiĝintaj terminoj, ĉar la no-

cioj ne havas realigon (ekz. ne ekzistas plena gamo de lerneja sistemo en Esperantio aŭ la ĝentilecformoj ne havas normojn). Ĝia avantaĝo estas la fleksebleco, dank'al kiu eblas esprimi nociojn gravajn por unu aŭ alia etna lingvo. Tiel Esperanto funkcias kiel interkultura komparilo.

Trovi rilatojn inter diversaj nocioj kaj malsamaj lingvoj, kaj tiel migri en la lingva pejzaĝo de la mondo, estas alloga alvoko ankaŭ por la uzantoj de la etvortaroj.

Ilona Koutny

(vortaroj estas mendeblaj ĉe la redak-
tejo de PE aŭ ĉe la aŭtorino)



Fariĝu membro de ILEI!

Aktuale estas du kategorioj de membreco: (1) kun elektronika versio de „Internacia Pedagogia Revuo” kaj „Ligilo” de la pola sekcio de ILEI; (2) kun papera versio de IPR kaj „Ligilo”.

Kategorio (1) — la kotizo egalas al 2 EUR + 5 PLN. Kun la kotizo sendu nepre vian retadreson.

Kategorio (2) — la kotizo egalas al 54 PLN.

Limdato por kotizoj de ILEI kaj abonoj de la revuoj estas la 10an de decembro 2003! Ĉiujn pagojn (kotizoj kaj abonoj) akceptas: Magdalena Tatara, 32-020 Koźmice Wielkie 323 k/Wieliczki (tel. 012-451 11 39).

Memoru, ke vi povas ankaŭ fariĝi sponsoro de tiuj, kiuj persone ne estas tro riĉaj (inter alie junularo)!

JUNA AMIKO

Kvaronjara E-revuo eldonata en Hungario; amuza kaj instrua, tre taŭga por klubaj renkontiĝoj, klasoj kaj unuopaj legemuloj, komencantoj kaj progresintoj.

Abonprezo por 2004 egalas al 34 PLN (reduktebla kaze de komuna sendado al unu sama adreso: 2-4 ekz. po 29 PLN, ekde 5 ekz. po 23,50 PLN).

Petu senpagan numeron al: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7/122, 30-150 Kraków (tel. 012-638 14 49).

SCIENCA REVUO

Kvaronjara, eldonata en Germanio, tre interesa, plurfaka, kun longa tradicio. Abonprezo por 2004 egalas al 49,50 PLN.

„Vivo de Andreo Cseh“

Apero de biografio pri Andreo Cseh lanĉita al Esperanta merkato estas ne nur kultura evento, sed frukto de kvardekjara maturiĝo de koncepto prezenti al la mondo kaj monda esperantistaro mitan figuron de primovada pioniro kaj aŭtoro de la plej efika kaj spektinda metodo instrui Esperanton.

Morala devo de Internacia Esperanto-Instituto kiel eldonisto estas dokumenti meritojn kaj omaĝi memoron de la plej eminenta populariganto de la internacia lingvo. La Esperanto-Instituto en Hago, kies

kardinala celo estas eduki kaj doni bonajn instruistojn al publiko deziranta lerni Esperanton, aperigis kompleksan biografion pri vivo de Andreo Cseh. Ed Borsboom kiel multjara organiza kaj instrua kunlaboranto de Andreo Cseh prilaboris la biografian verkon, suplementante ĝin per biografioj de esperantistaro, diversmaniere ligita kun Andreo aŭ samtempe aganta por la interna ideo. Filologia kaj organiza sperto permesis al la aŭtoro de biografio kompletigi fontan dokumentaron

kaj prilabori kompleksan biografion pri la kreinto de la rekta metodo de instruado.

La libro pri vivo de Andreo Cseh permesas al leganto kronologie promeni tra interesaj eventoj el vivo de Andreo kiel ideano, pedagogo, populariganto kaj organizanto de Esperanta vivo, komencante de liaj unuaj Esperanto-kursoj, tra famaj prelegoj kaj internaciaj kontaktoj, finante ĉe la fondo kaj evoluigo de Internacia Esperanto-Instituto en Hago. Oni devas substreki, ke Esperanta aktiveco de Andreo Cseh ne povis realiĝi sen ideo engaĝiĝo kiun kaŭzis



psika ŝoko, rezultita de profunda konsciĝo pri celo kaj valoro de Zamenhofa Esperanto-ideo kaj Esperanto-lingvo. La psika kaj poridea transformiĝo de Andreo fariĝis motoro de lia vivo.

Por instruistoj de Esperanto specialan valoron havas sindediĉo de la Esperanto-Instituto al profesiigo de la tutmonda Esperanto-instruado kaj sindevigo al plialtigo de lingvaj kompetencoj por diplomitaj instruistoj de Internacia Esperanto-Instituto, kiuj ne nur rajtas instrui laŭ la

Cseh–metodo, sed ankaŭ transdoni ties atestojn.

Ampleksaj protokoloj pri Esperanto–kursoj gviditaj de Andreo Cseh stimulas imagon de ĉiu interesiĝanta leganto pri universaleco de la instrumetodo. Ankaŭ leginda estas lia norda kaj slava prelegvojaĝo dum la jaroj 1930–32, populariganta en Eŭropo kaj en la mondo lian instrumetodon.

Aktiva kaj intereseema esperantisto observante sekvajn eventojn el la vivo de Andreo Cseh povas admiri obstinecon kaj ellerni, kiel batalvenki malfacilaĵojn de pionira vivo, sed ankaŭ kiel efike kaj solide organizi entreprenojn kompareblajn kun Universala Ligo, Internacia Esperanto–Instituto kaj eĉ Universalaj Kongresoj.

La biografio estas ne nur interesa enhave, ĉar aŭtoro disponas per nelimigita aliro al fonto–dokumentoj, sed pro la fakto ke Ed Borsboom majstras per altnivela lingvo kiu kontentigas ne nur spertajn legantojn. La libro estas altgrada konversacia materialo por perfektigantaj instruistoj; ankaŭ eduka, historia, biografika kaj lingva valoroj estas nekontesteblaj.

La libro estas mendebila ĉe IEI kontraŭ 18,00 € + sendokostoj, kun triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Formato: 210×135, paĝoj 317 kun ilustraĵoj, grizkolora kovrilo, ISBN 90–805651–2–1.

Antoni Jerzy Walaszek

„Krótká historia Volapüku”

Esperanto–Societo FLAMO el Toruń eldonis pollingvan libreton de Katarzyna Tempczyk: „Krótká historia Volapüku” (Mallonga historio de Volapük), pritraktantan eventoplenan historion de volapuko ekde pastro Schleyer, trans pli ol 120 jaroj de ekzistado de volapuko, ĝis ĝia nuntempa stato: cirkonstancoj, en kiuj pastro Schleyer kreis sian lingvon, ties rapida disvastigo, modo je volapuko kaj kaŭzoj de ĝia rapida falo, volapukaj kongresoj, eldonaĵoj, polaj volapukistoj kaj lernolibroj, 20–jarcentaj provoj de reformo kaj revigliĝo de la volapukista movado, volapukaj inspiroj en literaturo kaj arto, fragmentoj de intervjuoj kun nuntemaj volapukistoj...

La libro entenas ankaŭ ĉefajn informojn pri la lingvo mem — ĝia vortaro, bazaj principoj de vortformado kaj gramatiko. Ĉio priskribita sur 40 paĝoj en facila anegdotplena stilo.

Krom la s.m. libro, estas disponebla aro de aliaj libretoj, inter kiuj menciindas: „Planado de instrumaterialoj en lernejoj”, „Esperantaj parol–turnoj kun ekzercoj”, „Sociologio de E–movado”, „Norma esperantologio”, „Homaranismo” kaj multaj aliaj.

Pri la detala listo kaj prezoj kontaktu la eldoniston:

Esperanto–Societo FLAMO
skr. poczt. 16

87–100 Toruń 1, Pollando

NOVAĴOJ EL VARSOVIO: ESPERANTO-TEATRO „ESPERO”

La listo por la sezono 2003/04 de nia Esperanto-teatro „ESPERO” estas jam la 21a, kaj la 13a en la Art’-Galerio „Nusantara”. Ni lanĉis ĝin per spektaklo „Aniara” bazita je eposo s.t.: „Aniara” de Harry Martinson — Nobelpremiito, en traduko de Bertil Nilsson kaj William Auld. Kompilita por nia teatro de Gunnar Gällmo. Ĉi-spektaklon Jerzy prezentis dum la 88a UK en Gottenburgo ĉi jare. Valoras menci, ke al plivalorigo de spektaklo, per filmo surfone de kiu la aktoro prezentas ĝin, kontribuis finance Departamento de Promociado de Kulturo de Ministerio de Eksterlandaj Aferoj, kaj ĝia reprezentantino s-ino Elżbieta Wykrętowicz ĉeestis la inaŭguran, varsovia spektaklon.

Kun kontento oni devas noti, ke ankaŭ aliaj instancoj aprezas nian aktivadon kaj laŭeble apogas.



Laŭ iniciato kaj propono de Ambasadoro Andrzej Wawrzyniak — direktoro de Muzeo de Azio kaj Pacifiko, kie — kiel notite — jam 13 jarojn oni gastigas nian teatron, la 7an de junio ĉi-jare estis atribuita al Zofia Banet-Fornalowa distinggo, fare de Ministerio pri Kulturo. La distingon enmanigis Direktoro de Departamento pri Muzeoj de la Ministerio — s-ro Franciszek Cemka (vidu apudan foton); estis substrekite, ke ĝi estas atribuita pro „Proksimigo de Kulturoj pere de Esperanto”. Ŝajnas, ke ĝuste tiu motivigo estas esence grava.

Kiel gravan, ne nur por mi, sed entute por la Movado, oni ankaŭ devas konsideri aperon, ĵus antaŭ la komenco de ĉi-jara UK, de libro — „La Pereintoj in memoriam” (280 p.) verkita de subskribintino. Ĉi-jare pasas la 60a datreveno de fina likvido de la varsovia kaj bjalistoka getoj, kio signifis decidan neniigon de milionoj da pollandaj kaj alilandaj eŭropaj judoj fare de germanaj nazioj. Inter ili troviĝis miloj da niaj Samideanoj, ardaĵ batalantoj por pacca kunvivado de popoloj. La verko estas dediĉita al la Sesopo de pollandaj, internacie rekonataj Homaranoj, kulturkreintoj al kiuj pro freneza rasteorio ne estis permesite vivi.

Ĝi enhavas eseojn al ili dediĉitajn,

specimenojn de ilia valorega verka-
do, ankaŭ poemojn de elstaraj poe-
toj: Wisława Szymborska — No-
belpremiitino, Jerzy Ficowski kaj
Lodevijk C. Deij, kiuj senkondiĉe,
bonvoleme konsentis enmeti en ĉi
verkon siajn profunde humanism-
ajn, kortuŝajn poemojn por tiama-
niere omaĝi al la Viktimoj de Holo-
kaŭsto.

Mi esperas, ke ĉi libro formas di-
gnan Omaĝon kaj, ke danke al ĝi
Tiujn kaj ĉiujn aliajn Neniigitajn ne
kovros vualo de forgeso, ĉar ili restos
por ĉiam en niaj koroj kaj memoro.

Zofia Banet-Fornalowa



NOVA ESPERANTO-TEATRAĴO

En la urbo Toruń oni prezen-
tis provludon, por limigita aro da
ĉeestantoj, de la teatraĵo „Ĉiu ha-
vas sian monton”, fare de la Junula-
ra Teatro STUDIO „P”. Ĝi estos ofi-
ciale prezentita kaj premierita en
novembro en Berlino, okaze de la
datreveno de la tiea Esperanto-Aso-
cio. Fine de la provprezentado, la
ĉeestantoj donis siajn opiniojn, pro-
ponojn kaj sugestojn por eventua-
laj ŝanĝoj.

STUDIO „P”, la junulara teatro en
Toruń, aktivas ekde la jaro 1972. Ĝi
realigas siajn spektaklojn en la pola
lingvo, kaj ekde la jaro 1979 ankaŭ
en Esperanto. La teatro specialigās
en surscenigoj de la nuntempa lite-
raturu, rakontante pri homaj sopi-

roj, ĝojoj kaj maltrankviloj pere de
poezia metaforo. STUDIO „P” ri-
cevis jam multajn premiojn en tea-
traj konkursoj enlande kaj eksterlan-
de. La ensemblo ĝis nun prezentiĝis
en 12 landoj de Eŭropo; inter alie
dum la Universalaj Esperanto-Kon-
greso en Hungario, Norvegio, Hi-
spanio, dum la Junulara Kongreso
en Rusio kaj dum diversaj esperan-
tistaj aranĝoj en Ukrainio, Hispa-
nio, Italio, Slovakio, Latvio, Svedio
kaj Belgio.

La teatraĵo estas „la spektaklo pri
mondpercepto de juna sentema kna-
bo: ĈIU HAVAS SIAN MONTON”.

La knabo B loĝas en malgran-
da urbeto. Li volas esti poeto. En
la kalejdoskopio de poeziaj imagoj
oni observas lian maturiĝon en fa-
milio, en lernejo, inter amaskomu-
nikiloj kaj diversaj manipulantoj.
Laŭvicaj etapoj de lia maturiĝado al
poezio estas: infanaj rimaĵoj, versaĵoj
esprimantaj malkonsenton, ribe-
lon kontraŭ ĉirkaŭanta realeco kaj
ankaŭ aperanta dubo pri siaj fortoj,
provo de sincera konfeso. La finalo
portas esperon pri efektiviĝo de la
revoj — atingo de sia monto.

La artgvidantino estas Lucyna
Sowińska; la traduko kaj konsulta-
do pri Esperanto estas de Teresa Ne-
mere.

La junaj geaktoroj perfekte kaj
profesie rolas, kaj ilia Esperanto-pro-
noncado estas perfekta.

Dum la tagoj 12–14.09.2003 okazis en Gliwice laŭvica Konsultiĝo de landaj reprezentantoj de mezeŭropaj E-organizaĵoj.

Partoprenis ĝin krom gastigantoj, reprezentantoj el Ĉeĥio, Slovakio Hungario kaj Kroatio. UEA reprezentis s-ino Michela Lipari.

Delegacioj preparolis diversajn aferojn ligitajn kun E-movado en koncernaj landoj. Oni proponis kalendaron de Esperantaj aranĝoj por la jaro 2004.

Estis preparolita ankaŭ situacio kaj defendo de la lingvoj post la membriĝo al strukturoj de EU. Gastoj povis konatiĝi ankaŭ kun interesajoj de la urbo Gliwice kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

Dum konsultiĝo estis proponita tripersona komitato por gvidi la agadon de Mezeŭropa Komisiono: Stanisław Mandrak (Pollando), Juraj Gondzur (Slovakio) kaj Spomenka Štimec (Kroatio). Pri kandidatiĝo de Spomenka interkonsentis la reprezentantoj de kroata delegacio.

Konsultiĝon patronis prezidento de la urbo Gliwice.

Pri konsultiĝo skribis kelkaj lokaj kaj regionaj gazetoj.

Nome de gastigantoj

Stanisław Mandrak
— **prezidanto de PEA**

Kunsido de la Ĉefa Estraro de PEA

Antaŭ la komenco de tradicia aranĝo GRUPE-7 la 8an de novembro en Gliwice okazis laŭvica kunsido de la Ĉefa Estraro de PEA. Krom multaj diversaj problemoj, kiujn pri taksis estaranoj, tre gravaj estis tiuj ligitaj kun la fino de la nuna agadkadenco. Ne estas facile trovi la homojn, kiuj volus (-os) labori en la nova ĈE, kvankam situacio de la sekvontaj estaranoj estos pli komforta ol nun. Pliboniĝis organiza situacio, preskaŭ finitaj estas financaj kaj ekonomiaj problemoj. Aperis kelkaj lernomaterialoj kiujn eldonis Kazimierz Leja, ktp.

Ĉefa Estaro oficiale akceptis rezolucion por alvoki la kunvenon de delegitoj de PEA en la unua jarsezono de 2004. Estis akceptita ankaŭ „ŝlosilo” por la filioj — unu delegito por ĉiu komenciĝinta 50 de anoj. Granda plezuro por la finanta sian laboron Estraro estis akcepti rezoluciojn, ligitajn kun la novfonditaj filioj de PEA: en Krakovo kaj en Pelplin. La unua signifas, ke strukture PEA revenis al malnova Krakovo. Gratulojn al esperantistoj en Krakovo kaj Pelplin.

Krome ĈE akceptis proponon de lokaj grupoj por turniĝi laŭ statuto

al Kunsido de Delegitoj por nomi mi novajn „Honorajn Membrojn” de PEA.

Mencias aldoni ke en la tagoj 9–10.11.2003 kunsidis ankaŭ la Ĉefa Revizia Komisiono, kontrolante la dokumentaron de la ĈE de PEA.

Bonaj novaĵoj el Bjalistoko

Kun granda plezuro mi informas la tutan mondon, ke la 14an de septembro okaze de 490 naskiĝtago de Podlaĥia Vojevodio en Bjalistoko — la naskiĝurbo de Esperanto — okazis surstrata festo dum kiu ankaŭ esperantistoj forte reklamis Ludovikon kaj Esperanton. Ni disdonis foliojn pri Esperanto kaj rakontadis al partoprenantoj la tutan tagon pri la valoro de nia hobbio. Ni invitis ĉiujn al nia Esperanto-centro.

La intereso pri Esperanto en Bjalistoko ankaŭ etendiĝas al la universitato. La 17–19an de oktobro, Kristana Ekumena Societo kaj Bjalistoka Universitato organizis la seminarion pri minoritatoj kaj kultura diverseco de la orienta parto de Pollando. La 18an de oktobro, la seminario temis pri Ludoviko Zamenhof kaj lia verko.

La projekto de Bjalistoka Esperanto-Societo „Esperanto — integracio sur la bazo de arto” ĵus ricevis bonegajn recenziojn ĉe la Pola Ministerio pri Kulturo kaj Nacia Centro pri Kulturo. Nun ni provas gajni fondusojn de EU. Se ni sukcesos — ni konstruos en Bjalistoko novan mu-

zeon: parte al Ludoviko parte al familio de pentristoj Ŝlendziński. Jam estas fiksita loko kaj projekto.

Ela Karczewska

Sukcesa GRUPE–7 en Gliwice

Ekde la 7a ĝis la 11a de novembro 2003, okazis en la sudpola urbo Gliwice la jam tradicia E–arangĝo „GRUPE”, ĉijare jam la 7a edicio.

Kun bunta kaj alloga progamo, en kiu troviĝis kaj prelegoj, kaj distraĵarangĝoj, kaj kulturaj vizitoj, la kongresanoj ĝuis veran internacian E–etoson, sen krokodiladoj, kaj kun alta lingva nivelo.

Menciindas, interalie, la prelegoj de Le Thi Thien Thu (Vjetnamio) „Esperanto en Azio kaj Vietnamio”, Roman Dobrzyński (Pollando) „Muroj kaj pontoj — aktualeco de Zamenhofa penso”, „Esperanto en Kroatio” far Zelimir Pehar (Aŭstralio), Augusto Casquero (Hispanio) „Propedeŭtika valoro de Esperanto por la lernado de fremdaj lingvoj por dulingvaj infanoj” kaj „Pacaj bataloj”, „Montaraj legendoj” far Danuta Źelińska (Pollando), „Mia poezio” far W. Lipowicz (Pollando). Marian Zdankowski lerte gvidis allogan „Esperanta kvizo”-n. Prezentiĝis la Eldonejo „Hejme” (Kazimierz Leja) kaj la revuo „Pola Esperantisto”.

Ĉeestis geesperantistoj el Pollando, Kroatio, Hispanio, Vjetnamio, Ĉeĥio kaj Germanio.

Augusto Casquero 191

LA INAŬGURO DE ESPERANTA MEMORTABULO EN LICHEŬ

La 21an de septembro 2003 okazis en la fama pola pilgrimloko Licheŉ, kie troviĝas la mirakla bildo de Dipatrino Doloranta Reĝino de Pollando tre grava aranĝo por esperantistaro.

Jen estis malkovrita kaj konsekrita la Esperanta memortabulo. La ceremonion partoprenis 32 gesamideanoj el diversaj partoj de Pollando. Estis du pastroj esperantistoj: pastro Jozefo Zielonka kaj pastro Stanislawo Płatek.

Post la malkovro de la tabulo kaj konsekro la partoprenantoj de la ceremonio preĝis la Anĝeluson. Poste pastroj kuncelebris la s-tan meson en la belega Sacerdota Kapelo de grandega kaj belega baziliko. Post la Diservo okazis interesa renkontiĝo, dum kiu unu sinjorino rakontis pri historio de la mirakla bildo en Licheŉ, baziliko kaj ĉirkaŭaĵo. S-ro Stanisław Mandrak — prezidanto de Pola Esperanto-Asocio rakontis pri Esperanta Ekumena Kongreso en Rimini kaj pri problemoj de pola IKUE-Sekcio, kiujn oni devas solvi, por ne estu honto antaŭ la internacia esperantistaro. Ja en Pollando naskiĝis Esperanto kaj el nia lando eliris la Papo Johano Paŭlo la Dua.

S-roj Bohdan Wasilewski, Leszek Łęgowski kaj Bogusław Sobol prezentis la religiajn poemojn en Esperanto. S-ro Wasilewski substrekis, ke antaŭ 100 jaroj aperis la unua espe-

rantlingva poemo. Ankaŭ laŭ la vortoj de nevivanta jam pastro, fervora esperantisto kaj poeto, Tadeo Nowakowski, oni kantis belan polan religian kanton en Esperanto.

La tuta aranĝo kaj ceremonio estis sukcesa kaj bonege preparita dank' al la klopodoj de s-ro inĝ. Bohdan Wasilewski, bonega esperantisto, kiu de multaj jaroj agas en la Esperanta sekcio ĉe la Klubo de Katolika Intelektularo, kaj s-ino Krystyna Zmitrowicz.

Jam nun oni planas ankaŭ venontjare renkontiĝi en tiu ĉi belega Sanktejo en Licheŉ por celebri la unuan datrevenon de la aranĝo, preĝi, kanti, danki al Dipatrino pro ĉiuj gracoj ricevitaj dum la jaro. Kaj eble venontjare ni renkontiĝos en internacia, familia, esperantista rondo? Valoras, por ke ankaŭ eksterlandanoj vizitu tiun ĉi Sanktejon, kie troviĝas laŭ la informoj la 7a laŭ la grandeco baziliko en Eŭropo, kaj antaŭ ĉio kliniĝu ĉe la mirakla bildo de Dipatrino.

Bogusław SOBOL

Karegaj Gefratoj en Kristo, Geamikoj, Gesamideanoj.

Mi deziras esprimi mian grandan dankemon al ĉiuj Vi, kiuj dum lastaj balotoj al IKUE voĉdonis por mia kandidateco al la estraro. Elkore mi dankas! Dio rekompencu! Mi esperas, ke dank' al Dia beno ni scipovos ĉion fari por ke nia Katolika Movaĉo estu forta en la mondo kaj ni solvos la problemojn de IKUE-sekcio en nia lando.

Bogusław SOBOL